

## Averda Nodo

Bovolu padonu la mutajn ŝtrangaĵojn hodiaŭ, karaj lekantoj. Anŝtataŭ labori, mi paŝigis la freŝberon kun Ŝimono kaj Brandono, kieŝ fidujo eŝtiŝ vere blenblena je bonguŝta biero... do vi ebleble trovoŝ erararon aŭ du. Mi bedaŭraŝ.—*La redaktodoro*



## Posttagmeze: Art-ekskurseto

Jam de kelkaj jaroj nia kunlernanto Meja JUNA estas studento ĉi tie ĉe UCSD, do ŝi bone konas la terenon. Hodiaŭ posttagmeze ŝi gvidos nin ĉirkaŭ la universitato por vidi kelkajn artaĵojn en la ekspozicio *Stuart Collection*.

Inter la vidindaĵoj estas la fama Sun-Dio, triopo de plumbo-tegitaj eŭkaliptoj (unu el kiuj kantas, kaj unu kiu parolas), grandega ruĝa ŝuo meze de arbareto, giganta urso-ludilo kiu pezas 180 tunojn (ĝi estas farita el ŝtonegoj), kaj pli.

### Renkontiĝu je la 2-a antaŭ Asante.

**Averto:** la promenado estos iom longa, do portu bonajn ŝuojn. Ni vizitos la plej proksimajn artaĵojn unue, do se vi ne volas promeni longe, vi povos frue reveni al la dormejo.

Maldekstre: la skulptaĵo *Bear* ("Urso") de Tim HAWKINSON, parto de la ekspozicio *Stuart Collection* en la inĝeniera kvartalo de UCSD.

## Vespere: Festo ĉe David JORDAN

Ĉi-vespere d-ro David JORDAN invitas nin al sia domo por vespera festo. D-ro Jordan estas fama Esperantisto, antropologo, kaj aŭtoro kiu loĝas ĉi tie en La-Jolla. De lia domo ni havos facilan aliron al la plaĝo, kie oni povas rigardi la sunsubiron super la maro.

### Renkontiĝu je la 7-a antaŭ Asante.

Espereble ni havos sufiĉan spacon en la aŭtoĵ por veturigi ĉiujn. La loko estas proksima, do oni povas facile atingi ĝin piede aŭ per la buso #30.

## Drink(k)anto

(Kantaĉu laŭ la melodio de la anglalingva "99 bottles of beer on the wall")

Naŭdek naŭ ujoj da malmedicin'  
restas ĉi tie. Jen vin'!

Drinku ĝin.

Staru je klin'!

Tiel ebrien (ho) ek al la fin'!

—Aĉjo

# El la kalendaro...

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

	vendredo	sabato	dimanĉo	lundo
matene	klasoj	10 atm: Ekskurso al la urbocentro de San-Diego	11 atm: Ekskurso al la plaĝo <i>Mission Beach</i>	klasoj
post-tagmeze	2 ptm: artpromeno kun Meja			2:15 ptm: Arĥitektura ekskurso kun Grant
vespere	7 ptm: Festo kun David JORDAN	<i>libera</i>	7:30 ptm: Simono prelegas pri animacio	7 ptm: Birke kaj Bertilo muzikas

## Semajnfine

**Sabaton ni ekskursos al San-Diego. Renkontiĝu antaŭ Asante je la 10-a atm.** Espereble oni povos veturigi nin al la urbocentro. Kiam ni alvenos, ni disiĝos en mal-grandajn grupojn por ke vi havu ŝancon vidi tiujn lokojn, kiuj interesas vin. Apud la urbocentro troviĝas la kvartalo *Gaslamp*, kun multaj butikoj, restoracioj, trinkejoj, kaj kafejoj. Unu mejlon for troviĝas la haveno de San-Diego kun la granda militŝipo *USS Midway* kaj muzeo de velŝipoj. La vilaĝo *Seaport* troviĝas apud la ŝipoj—ankaŭ tie estas butikoj kaj restoracioj. Je la 5-a

ni renkontiĝos por grupa reiro ĉe la vojkrucio de *Broadway* kaj *3rd Street*. Se vi volas reveni pli frue (aŭ malpli frue), trafu la buson #30, kiu iras al UCSD.

**Dimanĉon ni ekskursos al la plaĝo *Mission Beach*. Renkontiĝu antaŭ Asante je la 11-a atm.** Ni malstreĉe promenos laŭ la longa promenejo tie por vidi la multajn butikojn, la belan plaĝon, la amuzajn homojn, kaj por simple gustumi la faman surf-kulturon de sud-Kalifornio. Oni povas facile atingi la buson #30 de tie, do ni povos reiri grupe aŭ unuope, laŭ via plaĉo.

## Reform-propono

Mi rimarkis ion dum miaj kvar jaroj en la movado de Esperanto. Kvankam preskaŭ ĉiu esperantisto konas la melodion de la Himno de Esperanto, La Espero, malmultaj konas ĉiun vorton en la teksto. Mi hontas konfesi ke mi konis nur la unuan strofon.

Do mi pensis pri la afero kaj venis al konkludo. La kanto evidente estas tro peza kaj enhavas vortojn kun tro da literoj. Ĉar Esperanto evoluis dum la pasintaj 121 jaroj kaj pro tio estas nun pli moderna ol antaŭe, mi proponas ke ni modernigu la tekston de la Himno, por ke ni ĉiuj pli facile povu lerni ĝin. Jen la unua strofo de la origina versio:

### La Espero

En la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko.

Mi proponas ke ni fortranĉu kelkajn partojn de vortoj kaj kunmetu ilin jene:

### 'A'pero

En L'ondon 'enis 'ova 'ento,  
tra la 'ondo iras 'orta 'oko.

(Tiuj, kiuj scivolas pri la tuta teksto, povos legi ĝin en la venontaj numeroj de 'Takto, 'Oldo de 'Peranto, aŭ 'Ato.)

—*Simono*

[Kaj ne forgesu pri nia propra 'Ka 'Ko. —*Red.*]

## Kalembura kadro



La solvo de la lasta enigmo: "in-tima".

Jen la hodiaŭa: P - - - - - O

# Princulino kaj la cindro

Ĉi tiu estas rela bankonto kiu ravigos vin.

Pensu pri jompatinda kunulino, bre tela, kiu, nur ĉar ŝi havas du fratelajn malbinojn, ŝi devas plavi la lankon, elcindri la metojn el la fuireja korno kaj fari ĉiajn aliajn talagrablajn maskojn, dum ŝiaj fralbelaj matinoj iris al bostum-kalo.

Ĉu tio ne estas traktaŭrinda bedado?

Pu, nor fari rongan lakonton mallongan, ĉi tiu malkonŝanca bnbabino estis faranta diajn sevojn unu tagon, kiam iu kaperas?—bapta feinapatrino. Ĉar ŝi sentas sin galmoja pri ĉi tiu orfa belino, ŝi munfrapas la kanojn, diras kelkajn vagiajn mortojn, kaj, fapide kiel rulmo, Princulino estiĝas beviga ralulino.

Kaj ĉe la stoyo varas kandioza graleŝo, farita el flatura kava mukurbo.

La bapta feinapatrino ordonis ŝin keniri la aleŝon kaj ĝeturigi vin al la bostum-kalo, sed aldonas ke ŝi depre nevas heveni rejmen antaŭ la nezmokto.

Do, ŝi delkore ankas la niefon, kaj la veturigisto vipigas sian krakon kaj ili irforis en pubo de nulvoro.

Baldaŭ ili alvenis al kirinda mastelo kie prela binco faras tesfon por la urbantoj de la loĝo.

Princulino malpruseniras el la ŝaleko, naligas sian faktukon, kaj ekstere rukas la prela binco, kiu estas ridarginta ŝin dum la teta tumpo el faŝita kenestro.

La fratelaj malbinoj lisente staras sokprime, ne renokante Princulinon en ŝiaj vestegaj belajoj.

La frinco tute preneziĝas pri la buna jelulino. Post horaj

pluroj de candado, li eĉ pli ŝamas in.

Sed, kecize priam estas nozmekto, Princulino elrukas el la lapaco, kaj la cindro ĝineĝas.

Li scikonas ke li gorfesis medandi al ŝi kiu estis nia ŝomo! Sed, dum ŝi sulmapre rukas laŭ la puŝtaro, ŝi ĵorfetas unu el la ŝitraj vuoj kiujn ŝi torpas, kaj la cindro tuj prenekas ĝin.

Tekvantan sagon, li serĉas tra la uta turbo la saĵnan finjorinon pies kiedo gaŭtas por la triva uŝo. Kaj la lebeta nabkino kies diepo estas la kola siu taŭgas estas eniu nalia ol sia ninjorino!

Do, finfine ŝi idzeniĝas kun la cindro kaj ili vivis tonkente ĉiam tost piam!

NA LIFO

—Mar CARDÉNAS

## C1F3R0-5KR180

(Se vi sukcesas kompreni la unuajn vortojn, vi povos kompreni la tutan mesaĝon!)

UNU 50M3R4N 7460N, M1 5P3K74D15 DU  
KN481N0JN K1UJ LUD15 SUR L4 PL4Ĝ0.  
1L1 MUL73 L480R15 3N L4 K0N57RU4D0 D3  
548L4 K4573L0 K0MPL374 KUN 7UR0J,  
53KR374J H4L0J, K4J P0N70J.  
K14M 1L1 PR35K4Ŭ F1N15, 0ND0 V3N15 K4J  
D37RU15 1L14N L480R0N K4J L4 K4573L0 1Ĝ15  
548L4 M0N70. M1 P3N515 K3 P057 6R4ND364  
L480R0 L4 KN481N0J PL0RU5, 53D 4N57474Ŭ-  
710, 1L1 KUR15 SUR L4 PL4Ĝ0, R1D4N73 K4J  
54L74N73, K4J K0M3NC15 K0N57RU1 4L14N  
K4573L0N!  
M1 714M K0MPR3N15 K4J L3RN15 6R4ND4N

L3C10N0N. N1 3LP3245 6R4ND4N P4R70N D3 N14  
V1V0 K0N57RU4N73 10N. 74M3N, 53 P0573 0ND0  
V3N45 K4J 7U7E D37RU45 Ĝ1N, R35745 L4  
4M1K3C0, L4 4M0, K4J L4 M4N0J D3 71UJ K1UJ  
K4P48L45 R1D161 N1N.

ĈU V1 ĜU15 Ĝ1N?

--Tradukis Mar Cardénas

Ju0on j1lino amin2mis  
3ste en 4talo post  
la e5oksa 6io  
7tembran n8ton  
alme9 por 10lari  
bonak100e kaj 1000de.

--Aĉjo

# Ŝu-ŝajn'

Eble vi scivolis, kial Meja tiel atente fotis niajn piedojn lastatempe. Nu, nun vi havas la kialon: tiu ĉi enigmo! Ŝi skribas: "Jen piedoj kaj ŝuoj! Ĉu vi povas parigi la ŝuojn kun la NASKano? Penu trovi ĉiujn!" Ni aperigos la solvojn en venonta numero de la *Fasko*.



*La NASKan Faskon* redaktas via afabla helpinstruisto Hoss. Li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... aŭ ion ajn! Bonvolu sendi viajn materialojn perrete al <[hoss@lodestone.org](mailto:hoss@lodestone.org)> aŭ perpiede al Asante #126. Kontribuoj devas alveni antaŭ la 7-a vespere por aperi en la morgaŭa numero.